

Kial oni ne trovas la sepultejon de la esperantisto Andrés (Andreu) Nin?

La murdo de Andrés Nin en 1937 koncernas du datrevenojn:

-la 80a jaroj de la hispana revolucio dum la civitana batalo de 1936-1939;

-la celebrado de la spontana rusa revolucio de la liberaj sovietoj en februaro 1917, adulterita de la markismo leninismo.

Andrés (Andreu en la katalana lingvo) Nin i Pérez naskiĝis en 1892 en El Vendrell, vina regiono sude de Barcelono. Tie li lernis esperanton kun entuziasmo kaj post la V kongreso de Esperanto de 1909 en Barcelono li skribis en kataluna lingvo «La esperantismo havas, en Katalunio, feliĉan vivon kaj nedetruoblan forton.»¹



Samtempe Nin laboris kiel intruisto kaj ĵurnalisto por la gazetaro socialista kaj liberacana sindicalista. «Lia sindikata aktiveco portis lin al Sovetunio. Tie eble lia scio de esperanto povis helpi lin je la komenco, ja eĉ altranguloj en Ruĝa Sindikata Internacio kiel Lozovskij kaj aliaj simpatiis al esperanto, sed ni ne povas tion aserti.»²

Ĝuste la marksista leninista partio unue favoris esperanton, poste subpremis ĝin: «En Sovetio la esperanta lingvo estis aktive disvolvita ekde 1920 okaze de la propono de Trotski³. Oni ĝin multe lernis kiel *lingvo de la monda revolucio*. La esperanto estis uzita en la rondoj de *rabkor* [laboristaj korespondadoj]; en radioelsendoj [en Sovetio]. Tiam ekzistis eĉ dulingvaj klarigoj sur la poŝtelsendaĵoj: ruse kaj esperante (laŭ diversaj atestantoj tiaj poŝtelsendaĵoj plue daŭris, ekzemple ĝis 1946). Sed meze de la 30aj jaroj la responsuloj de esperanto en Sovetio suferis atakojn pro nepravaj faktoj: esti *trotskistoj* [grandega peko por la marksist-leninista registaro], *spionoj* kaj *teroristoj*».⁴⁵

¹ «Histories del Penedés:l'esperanto i l'Andreu Nin» [<https://blocs.mesvilaweb.cat/elbarrinaire/?p=170938>].

² Pedro M. Martín [Burutxaga] «Andreu Nin, perdita pioniro», 1992. [<http://www.esperanto.cat/e/retalls/esperanto/anin.htm>].

³ _N. B. Meĉkovskaja *Socialnaja lingvistiko. Iskustvenie jaziki posredniki i interlingvistika* [Sociala lingvistiko. Artefaritaj kaj helpaj lingvoj i interlingvistiko]. Moskvo, Aspekt-Press, 2000, p. 115. PDF.

⁴ Laŭ la artikolo de Nikolaj Stepanov «Kak eto bilo? [Kial estis tio?] » [<http://historio.ru/kaketoby.php>] kiu eldonis la nomojn, la datojn de aresto kaj de pafekzekuto de esperantistoj, kies nombro estas 28. Aliaj 25 estis nur kondamnitaj al 1 ĝis 10 jaroj de malliberejo.

⁵ «Istoria Esperanto [Historio de la esperanta lingvo]» [https://ru.wikipedia.org/wiki/%D0%98%D1%81%D1%82%D0%BE%D1%80%D0%B8%D1%8F_%D1%8D%D1%81%D0%BF%D0%B5%D1%80%D0%B0%D0%BD%D1%82%D0%BE].

Feliçe Andrés Nin estis elpelita de la «Patrio de la socialismo» en 1930 kun sia rusa edzino kaj siaj du filinoj. En Hispanio li laboris kiel tradukisto de la rusa a la kataluna lingvo aŭ la kastilia (hispana), kaj li ege disvolvis politikajn agadojn.

Kun siaj samideanoj Andrés Nin kreis en 1935 novan komunista partion nomitan POUM (Partido Obrero de Unificación Marxista [Laborista Partio de Marksista Unuigo]).

«Nin mem, kiu bone parolis la lingvon kaj uzis ĝin en mitingoj kelkajn jarojn antaŭe. La partio utiligis Esperanton en informaj agadoj, speciale per la eldono de iuj numeroj de la bultenoj *Informa Bulteno POUM* kaj *La Hispana Revolucio*, kaj ankaŭ per la elsendo de radiaj bultenoj.»⁶

Dum la hispana revolucio kaj samtempe intercivitana milito, ekzakte en junio 1937, Andrés Nin la ĉefrespondeculo kaj eks-ministro de Justico de la katalana Respubliko malaperis. La cirkonstancoj estis ege streĉitaj ĉar ekzistis alia reala interpolitika milito en la respublikana maldekstro.

La plej karakteriza trajto estis en la ĉefurbo de Katalunio, Barcelono, la sanga semajno de majo 1937 inter la laboristoj kaj iliaj malamikoj: la policistoj de la katalana registaro, kun la milita helpo de la komunistaj partioj de Hispanio kaj Katalunio.

Tuj post tiuj malĝojaj eventoj, kiuj signifis grandegan malsukceson por la revolucia laboro de socia ŝanĝo, la murdo de Andrés Nin ŝajnis esti la tragikan finon de la espero.

Andrés Nin estis perfide mortigita kiel maldekstra kaj esperantista aktivulo.

Efektive, la lasta artikolo de Andrés Nin insistis pri la viva bezono de socia ŝanĝo: «Prokrasti la revolucio ĝis la venko de la milito, egalas lasi liberecon al la burĝaro profiti de la malsukceson de la revolucia etoso, por denove starigi ĝian mekanismon de premo [...]»⁷

Andrés Nin estis malaperigita de turmentistoj de la Ĉeko aŭ NKVD de la sovieto registaro kaj de la hispana komunista partio en 1937 en Alcalá de Henares, ĉirkaŭ Madrido. Ĝis hodiaŭ, en la komunistaj arkivoj de Hispanio kaj Rusio, la esploristoj kaj historiistoj ne trovis, ne trovas, eble ne trovos la liston de la nomoj de la turmentistoj kaj iliaj estroj. Certe, kelkaj havis politikajn agadojn en la fikтивaj demokratiaj reĝimoj de Hispanio kaj Rusio.

Andrés Nin estas daŭre stranga figuro, 80 jaroj poste, de la hispana revolucio pro sia deziro sekvi la laboristan movadon kontraŭ tiuj, kiuj volas imponi al ĝi iun vojon al estonteco.

Ankaŭ stranga, en la centjaro de la rusa markista leninista revolucio, ĉar Nin estas la simbolo de la preskaŭ neebleco por la markistaj leninistaj partioj labori kune, en la nomo de la popolo submetiĝita al la nova ekspluatanta ruĝa burĝeco.

Tamen Andrés Nin estas heroa batalanto de la esperantista movado cent jaroj post la morto de Zamenhof.

Frank Mintz 27.10.17 [Nova versio, 08.11.17]

⁶ José Antonio del Barrio Unquera (Fundación Esperanto, Madrid), Ulrich Lins (DAAD, Bonn) «La danĝera lingvo en la hispana civitana milito» [<http://www.liberafolio.org/arkivo/www.liberafolio.org/2006/civitanamilito/>].

⁷ Andrés Nin «La situación política y las tareas del proletariado [La politika situacio kaj la taskoj de la proletaro] ».